

Esperanta Stenografio Duployé-Flageul
Kolekto de **FLUGANTA SKRIBILO**

LERNOLIBRO
de
ESPERANTA STENOGRAFIO
laŭ la sistemo Duployé
de
P. FLAGEUL

HONORA PREZIDANTO DE L'INTERNACIA ASOCIO
DE LA ESPERANTISTOJ-STENOGRAFISTOJ,
ARHIVISTO DE L'STENOGRAFA INSTITUTO DE FRANCUJO,
MEMBRO DE L'JUGANTARO DE UNIO DE L'STENOGRAFISTAJ
SOCIETOJ DE FRANCUJO,
DIREKTORO DE « FLUGANTA SKRIBILO »,
DIREKTORO DE LERNEJO POR KOMERCA SEKRETAŬEKO,
PROFESORO DE STENOGRAFIO EN LICEO MICHELET
KAJ EN LERNEJO ST-NICOLAS.

4^o ELDONO

Prezo : 1,50 franca franko
(1 respondkupono)

Eldonejo de Esperanta Stenografio
9, Bulvardo Voltaire
Issy-les Moulineaux (Seine) — Francujo

1932

Esperanta Stenografio Duployé-Flageul
Kolekto de FLUGANTA SKRIBILO

LERNOLIBRO
de
ESPERANTA STENOGRAFIO
laŭ la sistemo Duployé
de
P. FLAGEUL

HONORA PREZIDANTO DE L'INTERNACIA ASOCIO
DE LA ESPERANTISTOJ-STENOGRAFISTOJ,
ARHIVISTO DE L'STENOGRAFA INSTITUTO DE FRANCUJO,
MEMBRO DE L'JUGANTARO DE UNIO DE L'STENOGRAFISTAJ
SOCIETOJ DE FRANCUJO,
DIREKTORO DE « FLUGANTA SKRIBILO »,
DIREKTORO DE LERNEJO POR KOMERCA SEKRETAŬEKO,
PROFESORO DE STENOGRAFIO EN LICEO MICHELET
KAJ EN LERNEJO ST-NICOLAS.

4^o ELDONO

Prezo : 1,50 franca franko
(1 respondkupono)

Eldonejo de Esperanta Stenografio
9, Bulvardo Voltaire
Issy-les Moulineaux (Seine) — Francujo

1932

ALFABETO

KONSONANTOJ.

p b t d ĝ f v k g ĥ h l r
| — — — \ \ / / / / / /
m n ŝ ĵ ĉ s z c ĵ
C) () () () () () () ()

VOKALOJ.

a e i o u aŭ eŭ
o u e o u a u
an en in on un am em im om um
a e i o u a u

Finaĵoj : aj o ajn o ojn o

Esperanta Stenografio Duployé-Flageol

ĜENERALAJ RIMARKOJ.

1. — Ĉiam la konsonantoj devas esti skribataj en la pozicio montrata de la alfabeto. Oni skribas ilin antaŭen aŭ malsupren. Nur *l* kaj *r* estas skribataj supren.

2. — La vokaloj ne ĉiam havas la alfabetan pozicion. Oni skribas ilin tiamaniere, ke oni EVITU ANGULOJN.

3. — Por skribi stenografe sufiĉas :

a) Serĉi en la alfabeto la necesajn signojn;

b) Ilin kunigi ne levante la skribilon;

c) Se necese, aldoni la helpajn signetojn, sed *nur* post kiam la vorto estas finskribita.

4. — Ĉiam oni devas zorge atenti pri la formo, la grandeco kaj la pozicio de ĉiuj signoj. Senĉese oni devas klopodi por ĉiam belege skribi.

5. — Por obei la ĉefan regulon : « EVITU ANGULOJN », oni ŝanĝas la alfabetan pozicion de l'vokaloj, kaj oni skribas :

da		kaj ne		koro		kaj ne	
timi		kaj ne		rondo		kaj ne	

EKZEMPLOJ

MONTRANTAJ LA FORMADON DE LA VORTOJ.

La jenaj ekzemploj montras la signojn utilajn, por skribi la vortojn, kaj klarigas kiamaniere oni kunigas tiujn signojn.

Arboj o / | o a marŝu (o / n u u

florojn \ o / o a infanan \ o / r a

ŝparas o / o / u z Esperanto u / u / r - o u

6. — Kompreneble, por legi stenografajn, oni serĉu unue la signifon de l'signoj.

a o / | o ava a o / | o akvoj

a o / r okajn a \ o / o fakojn


a / o / o koko a / o / o pagojn

Oni devos lerni novan lecionon, nur kiam antaŭa leciono estos bone komprenita, kaj kiam oni estos kapabla senerare kaj senhezite legi kaj skribi la proponitajn ekzercojn.

Por ricevi bonan rezultaton, oni unue legu la vortojn stenografe skribitajn kaj oni kopiu ilin. Poste oni provu ilin denove skribi, ne rigardante la modelon, krom por komparo.

1. LECIĜNO.

Rektaj konsonantoj malsuprenirantaj kaj rondaj vokaloj



7. — Ĉiam oni devas skribi la ĉi suprajn konsonantojn malsupren.


Pozicio de l'Rondaj Vokaloj

Ĝenerala Regulo

8. — Kiam ronda vokalo troviĝas inter du konsonantoj, kiuj faras angulon, oni ĉiam skribas tiun vokalon ekstere de l'angulo.




9. — En ĉiuj aliaj okazoj, t. e. ĉe la komenco aŭ ĉe la fino de vorto, same inter du konsonantoj ne farantaj angulon, oni skribas la rondan vokalon dekstre de la ĉi supraj konsonantoj.



Rimarko : Por ke la skribo estu belaspekta, oni finu la unuan konsonanton sur la skriblinio.

EKZERCOJ 1.

Legu kaj kopiu.



Stenografu.

Ho! hoka, avaj, avoj, faga, fago, fagojn, kafaj, kafajn, kafo, kafojn, papavo, papavoj, povojn, vokoj, akvajn, apogoj, favo, fava, fokoj, hoko, kapa, ovaj, kápojn, ovo, kavoj, kavajn, pava, povo, kafo kaj akvo.

2. LECIONO.


Rektaj konsonantoj antaŭenirantaj.

t d ĝ l r
— — — / /


10. — Tiujn ĉi konsonantojn oni skribas dekstren; la tri unuajn horizontale, la du lastajn supren.

11. — Kiam la Ĝenerala Regulo ne estas obeebla (vidu I-an lecionon, reg. 8), oni skribas la rondajn vokalojn supre de la nun pritraktataj signoj.

Ekzemploj pri la Ĝenerala Regulo







tagojn doktoro lakado rokoj gorĝojn katalogo odoroj


Ekzemploj pri aliaj okazoj

aĝo akraj artajn oro datoj rolo lardo glora


12. — Kiam du rektaj signoj, skribotaj en sama direkto, sekvas unu la alian, tiam oni montras ilian apartigon per surmetita duonrondeto aŭ per nesimila klinigo.


La propraj nomoj estas ĉiam substrekotaj.

alloga  aŭ  Karlo  aŭ  Hago  Klaro 

Dua rimarko : Kiam la unua konsonanto de vorto estas l aŭ r, oni komencas ĝin sur la skriblinio.

EXERCICES 2.

Legu kaj kopiu.



Stenografu.

Afablaj, aglojn, akordo, agordo, agato, Agato, atakojn, barbaraj, bravajn, brovoj, forto, forkoj, haroj, horloĝo, korko, korpoj, kortojn, forrabo, lokojn, Padova, popoloj, raporto. La agrabla advokato varbota Aparta katalogo por roboj, toloj kaj drapoj.

3. LECIONO.

Kurbaj konsonantoj.

m n ŝ ĵ ĉ ŝ z c



14. — Oni skribas la du unuajn malsupren, la ses aliajn antaŭen.

15. — Kiam la Ĝenerala Regulo ne estas obeebla, oni skribas la rondajn vokalojn *interne de la antaŭa konsonanto*, kun kiu ili formas silabon.

Ekzemploj pri la Ĝenerala Regulo

mamoj notojn sato zorgas ĉano ŝakalo



Ekzemploj pri aliaj okazoj

modojn· mano· nomo· ĉasas· ĵaboto

16. — Ĉe la komenco kaj ĉe la fino de l'vortoj oni skribas la rondajn vokalojn interne de l'kurbaj konsonantoj.

amo ostoj panaj anaso ajo

EKZERCOJ 3.

Legu kaj kopiu.

Stenografu.

Akvo, almanako, barĉo, brosoj, bosko, gaso, famaĵ, formo, flamojn, forno, gazo, Marso, paŝo, kotono, ostroj, kaŝtanojn, okazo, ĉarlatano, hazardo, sklavo. La bona kaj kara kamarado marŝas paŝo post paŝo. La mastro klopodos por bona zorgado. La bananoj, la asparagoj kaj la rafanoj tro kostas.

4. LECIONO.

Malgrandaj duonrondoj kaj grandaj kvaronrondoj

i e u aŭ eŭ j
i e u aŭ eŭ j

17. — La signon *j* oni skribas en la pozicio plej oportuna por la skribo, kutime kiel ĉi supre.

18. — Ĉe la komenco de l'vortoj oni skribas la kvin ĉi-suprajn vokalojn je la sama flanko, kiel la rondajn vokalojn, kaj oni kunligas ilin kun la konsonantoj *ne farante angulon*.

19. — Tiam oni povas precizigi la sonojn, metante punkton super la duonrondeton por *i*, sub ĝin por *e*; eksteren de la kvaronrondo por *aŭ* kaj internen de ĝi por *eŭ*.

idolo edzo iloj elasta imago emajlo urbo Eŭropo, uzado
i d o l o e d z o i l o j e l a s t a i m a g o e m a j l o u r b o E ŭ r o p o , u z a d o

20. — Ĉe la fino de l'vortoj *i* kaj *u* estas skribataj dekstren aŭ supren. Male oni skribas *e*, *aŭ* kaj *eŭ* maldekstren aŭ malsupren.


palpi palpe gladu baldaŭ ami ame donaci donace halti halte
p a l p i p a l p e g l a d u b a l d a ŭ a m i a m e d o n a c i d o n a c e h a l t i h a l t e

21. — Post kurba konsonanto. ĈIAM oni skribas la kvaronrondojn eksteren. Post *k*, *g*, *l*, *r*, oni ĉiam skribas ilin dekstren.

amu naŭ ĉu lasu plu laŭ ĉirkaŭ
a m u n a ŭ ĉ u l a s u p l u l a ŭ ĉ i r k a ŭ


22. — En la interno de l'vortoj oni ŝkribas tiujn vokalojn ne farante angulon ĉiufoje, kiam tio estas ebla.

filo fero timi ĝemi ludi laŭdo




23. — Kiam angulo estas neevitebla, oni faras ĝin inter la vokalo kaj la sekvanta konsonanto.

peti pitono cedi sidi luli laŭro




24. — Ĉiufoje kiam estas eble, oni precizigas la signifon de l'duon- aŭ kvaronrondo, donante al ĝi la pozicion, kiun ĝi havas ĉe la fino de vortoj.

pipo pepi tiri tero lirika lerta minaci promeni pupo



EKZERCOJ 4.

Legu kaj kopiu.




Stenografu.

La frato klopodas, por iri al vi. Sako da karbo estas alportota de la najbaro, morgaŭ vespere. La domo de la patro estos baldaŭ tre agrabla loĝejo; la mebloj aĉetitaj por la salono estas belaj sed multekostaj. Ĉar la lumigilo brilegas, la domo ŝajnas pli bela. Rapidu, por iri kune al la lernejo.

5. LECIONO.


Malgrandaj kvaronrondoj.

an en in on un am em im om um



25. — La ĉi supraj signoj estas kvazaŭ-nazaj sonoj. Oni uzas ilin, kiam, en la vorto, la konsonanto ne estas sekvata de vokalo. Do estas kvazaŭ-nazsono en la vortoj an-gi-lo, ten-do, eŭ-ro-pan, sed ne estas tia sono en la sekvantaj vortoj : a-na-ga-lo, te-na-do, Eŭ-ro-pa-no.

26. — Ĉar la malgrandaj kvaronrondoj estas ofte skribataj en la sama pozicio, oni povas ilin karakterizi per iliaj helpaj signoj, kiuj estas ĉiam nevarieblaj.

27. — Komencante la vortojn, oni skribas tiujn signojn en pozicio mala de tiu de la aliaj vokaloj, krom antaŭ t, d, ĝ kaj l, r.

impresi onklo ankaŭ ungoj anso enŝovi antaŭ inda enlasi


28. — Finante la vortojn, oni skribas ilin eksteren de la kurbaĵoj kaj dekstren de k, g, ĥ, h, l, r.

min mem nin nun sen kun patran koron


29. — Post ĉiuj aliaj rektaj konsonantoj oni skribas *an*, *am*, *en*, *em*, *in*, *im*, samflanken kiel *i* kaj *u*; male oni skribas *on*, *om*, *un*, *um*, samdirekten kiel *e*, *aŭ*, *eŭ*.

ĝin dum kapan kapon kavan kavon aĝan aĝon
— — — — —

30. — Interne de l'vortoj oni skribas ilin kiel estas dirite pri la grandaj kvaronrondoj.

pensi punco tendi tondi tempo tombo volanta volonte
— — — — —

EKZERCOJ 5.

Legu kaj kopiu.

— — — — —
— — — — —
— — — — —
— — — — —
— — — — —
— — — — —

Stenografu.

Informu nin pri la kondiĉoj de la vendado. En Majo la kamparo estas vere admirinda pro la florantaj arboj. Kvankam mi ŝiris la poŝon de la pantalono, mi ne perdis la ŝlosilon de la mangoĉambro. Rigardu la infanojn; ili kuras en la ĝardeno, dezirante kapti belan birdon, sed ĝi malproksimen forflugas, pepante.

6. LECIONO.


Sinsekvaj vokaloj.

31. — Oni skribas la sinsekvajn vokalojn laŭ la ordo de la elparolo. Ili obeas la regulojn ĝis nun montritajn.

diaĵo teatro ĝui antaŭe ruinoj kruela laika vualo




32. — Oni skribas tiel: boato sed : haoso.



33. — Ĉe la fino de l'vortoj oni skribas ilin antaŭen aŭ malsupren.

alia aliaj aliajn alian kompanio tiuj krii glui brue




34. — Kiam vorto enhavas nur vokalojn, oni skribas la unuan en la alfabela pozicio.

ia ie iu iam iom



EKZERCOJ 6.

Legu kaj kopiu.



Stenografu.

les, jes, tia, tial, heroa, duigi, akcioj, iaj, sciigi, bluan, biero, detruu, silvion, trouzi, ion, mueli, Varsovio, miozoto, foiro, pereigu, kuirejo. Neniu metis koakson en la kameron, tial kvankam ni aŭdas tre ŝatindan poemon, la malvarmo, bedaŭrinde, neniigas nian entuziasmon.

7. LECIONO.

Nombrado.

1	2	3	4	5	6	7	8	9	0
1	-	\	/	/	c	o	o	o	o

35. — Ĉiam la ciferoj konservas la ĉi supran pozicion.

36. — Kiel la propraj nomoj, ili devas esti substrekitaj.

12	145	279	350	500	1932
<u>12</u>	<u>145</u>	<u>279</u>	<u>350</u>	<u>500</u>	<u>1932</u>


37. — Malgranda rondo apartigas la samajn rektajn ciferojn.

11	101	22	202	222	2,202
<u>11</u>	<u>101</u>	<u>22</u>	<u>202</u>	<u>222</u>	<u>2,202</u>

Tie ĉi la nombrado estas montrata kiel kuriozaĵo, ĉar praktike oni uzas pli volonte la arabajn ciferojn.

Skribo sen helpaj signoj

38. — En la kuranta skribado oni forigas ĉiujn helpajn signojn, kiel en tiu ĉi ekzerco, kiun vi facile tradukos.



LA ESPERO

من ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى

ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى

ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى

ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى

ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى

ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى
 ملى كى كى

FLAGEUL P.

Lernolibro de esperanta stenografio
Sistemo Duployé-Flageul
EES. Issy-les-Moulineaux (F). 1932
16 p. Kramp. 4a eld.

* EHG

Al Ĉiuj Lernintoj

La Esperanta stenografio Duployé-Flageul estas jam lernita en 28 landoj. Tiu ŝatinda disvastiĝo estas atingita — spite la malgravecon de la ĝisnuna lernolibro — pro la grandega simpleco kaj la perfekta lernebleco de tiu skribo.

La Duployé'a sistemo estas jam alfarita al pli el 20 naciaj lingvoj, kaj multaj stenografistoj uzas ĝin en kelkaj parlamentejoj : Francujo, Belgujo, Svisujo, Luksemburgo, Rumanujo, k. t. p. Ĝiaj praktikistoj trafis la plej grandan rapidecon en intersistemaj konkursoj, skribante 320, 360, kaj eĉ pli ol 400 (414) silabojn ĉiuminute.

Nedubeble, kiam la adeptoj de la internacia lingvo ekzerciĝos por uzi ĝin profesie, la lernintoj de tiu ĉi sistemo trafos, por Esperanto, samajn gravegajn sukcesojn.

Por helpi pli grandan disvastiĝon de nia rapida skribo en la tutmonda Esperantistaro, por uzi ĝin praktike kaj havi la eblecon ekzerciĝi, por baldaŭ esti pli lerta stenografisto, fariĝu membro de

STENOGRAFA INSTITUTO TUTMONDA

skribante pri tio — en Esperanta stenografio Duployé-Flageul — al Sro P. Flageul, 9, Bulvarde Voltaire, Issy-les-Moulineaux, (Seine), Francujo.

La Plej Gravaj Rekompencoj estas aljuĝitaj al tiu ĉi skribo en la internaciaj ekspozicioj de stenografio :

Bruselo 1927 : ORA MEDALO ; Parizo 1931 : ĈEFPREMIO

Impr. de Montligeon. — La Chapelle-Montligeon (Orne). — 24.364.

ALIGU AL

INTERNACIA ASOCIO DE LA

ESPERANTISTOJ - STENOGRAFISTOJ

(I.A.E.S.)

La celo de tiu Asocio estas :

Grupigi la izolitajn personojn kaj societojn, adeptoj de Esperanto kaj de iu ajn stenografa sistemo, por pligrandigi kaj plifortigi ilian agadpovon kaj plifacile realigi iliajn komunajn aspirojn;

Propagandi Esperanton en la stenografistaro kaj stenografion en la esperantistaro;

Informi siajn membrojn pri la diversaj sistemoj — naciaj kaj esperantaj — uzataj en ĉiu lando, kaj ankaŭ pri la stato kaj disvastigo de Esperanto kaj stenografio en ĉiu loko;

Studi — ekstere de ĉiu atento pri iu ajn stenografa sistemo — la demandojn sciencajn, profesiajn, ekonomiajn aŭ sociajn, kiuj interesas la stenografistaron;

Disvastigi la bonan instruadon de esperantista stenografarto per instruado de profesoroj kaj ekzamenoj de la gelernintoj;

Disvastigi la profesion de Esperanto-stenografistoj kaj konstante plibonigi la situacion de tiuj profesiistoj.

Ĉiuj membroj ricevas senpage la oficialan organon : **INTERNACIA STENOGRAFISTO**.

Sin turni al la Prezidanto : Sro. L. Cogen, Drève 52, Ninove, Belgujo.

Se vi loĝas en Francujo, Belgujo, Italujo, aliĝu ankaŭ la via nacia societo :

Franca Societo de Esperantistoj-Stenografistoj, 11, Cours Lazare-Escarguel, Perpignan, Pyrénées-Orientales.

Belga Societo de la Geesperantistoj-Stenografistoj, 52, rue de la Drève, Ninove, Belgujo.

Associazione nazionale Stenografi-Esperantisti, Via Duomo 184, Napoli, Italujo.

Kio estas la Stenografata Instituto de Francujo

Institut Sténographique de France, fondita en 1872 kaj oficiale deklarita « de publika utilo », estas neprofitema federacio enhavanta pli-malpli centon da societoj.

Ĝi celas diskonigi la stenografion, pliperfektigi ĝian instruadon, tiel en lernejoj kiel en publikaj aŭ privataj kursoj, plivastigi kaj plifaciligi ĝian uzon, kunhelpi per bona varbado kaj racia ierligado de profesiaj stenografistoj kaj steno-maŝinskribistoj.

Institut Sténographique de France, kies budĝeto estas kontrolata de la ŝtato, ne faras profitojn. Ĝiaj ĉefaj verkistoj forlasis tute aŭ grandparte por la propagando, la parton, kiu, laŭrajte, devus esti al ili pagita pro la vendado de iliaj verkoj.

Institut Sténographique de France praktike kontrolas la instruadon :

Aljuĝante, post ekzameno, al la estontaj profesoroj, diplomojn, atestojn pri kapableco por instruado de stenografio kaj maŝinskribo;

Organizante ĉiujare, pere de lokaj komisionoj, ekzamenojn de la lernintoj, kiuj ĉeestis la kursojn de ĝiaj profesoroj.

Ĉiuj, kiuj deziras ion sciigon pri stenografio povas sin turni al tiu Instituto, 24, rue Monge, Paris 5^o, Francujo, kiu korespondas en Esperanto kaj informos ilin senpage.

Se necese, ĝi konigos al la demandinto la adreson de la plej proksima el siaj 200 delegitoj, korespondantoj aŭ prezidantoj de filiigitaj societoj, kiujn ĝi havas en 27 landoj.

Ĉiuj membroj de *Institut Sténographique de France* ricevas la francelingvan gazeton.

LE STÉNOGRAPHE ILLUSTRÉ

Oni ne estas plene informita pri la stenografata movado en la tuta mondo, se oni ne legas tiun gazeton, kiu estas publikigata de pli ol 30 jaroj.

Petu senpagan specimenon de ĝia Direktoro :

**S^{ro} A. Navarre, 97, Avenue La Bourdonnais
PARIS (VII^o)**

POR LERNI

la Esperantan Stenografion Duployé-Flageul

	fr.
<i>Lernolibro de Esperanta Stenografio</i>	1,50
<i>Méthode de Sténog. Espérantiste et de Sténog. Française.</i>	2,00
<i>Esperanta Metagrafio</i>	4,00

POR LEGI

tiun Stenografion

<i>Poezioj, de L.-L. ZAMENHOF</i>	1,50
<i>Amuzaj Rakontetoj, de PEREF</i>	1,50
<i>Mallongaj Prozaĵoj, de diversaj aŭtoroj</i>	1,50
<i>Amatora Iluziisto, de MAGI EMUJO</i>	1,50
<i>Kelkaj Prozaĵ kaj Poeziaj Perloj, de L. COGEN</i>	1,50
<i>Stenografaj Desegnoj, de P. FLAGEUL</i>	1,50

(Tiu kolekto estas daŭrigota).

Por legi Esperantan stenografion Duployé-Flageul
kaj esti regule informata pri la
Esperanto-Stenografia movado

ABONU

la plej malnovan gazeton
en Esperanta Stenografio

FLUGANTA SKRIBILO

Petu senpagan specimenon
9, Bulvardo Voltaire, 9
Issy (Seine) — Francujo

(Bonvolu turni.)